Speciale / ویژه

# La savita martestudo

Maljuna martestudino apenaŭ povis naĝi. Ŝi renkontis delfeninon. La delfenino demandis: "Kien vi naĝas, mia amikino?" La keloniino respondis: "Al la malgranda insulo por ellasi miajn ovojn." La delfenino: "Sed tie estos danĝera por viaj idoj ĉar ekzistas multaj malsataj kraboj, korvoj kaj aliaj malicaj bestoj. Kial vi ne iras al la granda insulo? Tie estas pli imuna." La granda rampulino: "Mi scias ĉion sed mi ne kapablas naĝi al tiu pli fora insulo. Mi ne plu estas juna kaj ankaŭ fariĝis granda kaj malforta."




Poste ŝi adiaŭis kaj daŭrigis sian vojon. Ŝi pene sukcesis atingi la celinsulon kaj borinte truon sur ties marbordo, ŝi ellasis siajn ovojn en la truo.

Pasis tempo kaj malgrandaj idoj komencis eliri el siaj ovoj kaj arde klopodi atingi la oceanon. Sed kiel antaŭe diris la saĝa delfenino, ekzistis multaj danĝeroj. Ruĝaj kraboj trovis tiujn bestidojn taŭgaj manĝaĵoj. Nigraj korvoj konsumis multe da ili. Multaj el tiuj kiuj povis atingi oceanon, fariĝis viktimoj de kruelaj ŝarkoj. Nur malmultaj povis savi sin de danĝero-plena junaĝo.

Pasis jaroj kaj jaroj. Ĉiuj el tiuj iamaj martestudidoj jam forpasis, kelkaj pro malsato, kelkaj pro malsano kaj kelkaj pro kaptiĝo en la reto de fiŝistoj. Nur unu el tiuj gefratoj restis. Nun tiu ununura savito havas la aĝon de ĉirkaŭ 118 jaroj. Tiu verda besto esperas vivi longe kaj fariĝi la estro de ĉiuj bestoj en la oceano kaj tiam ordoni ke grandaj fiŝoj ne manĝu la malgrandajn, fiŝistoj ne kaptu fiŝojn, homoj ne malpurigu la akvon kaj multe da aliaj esperoj. Pro tio ĝiaj amikoj nomas ĝin "Esperanto".

Kejhan Sajjadpur
(*Okaze de la jubilea Universala Kongreso en la naskiĝlando de Esperanto*)

٥٤
3